# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-24 n-ro 395

# UN deklaris la 23-an de septembro kiel Tagon de Signolingvoj




Belgio/Sudano: kio okazis al la migrantoj, kiujn Belgio resendis al Sudano

Dependeco je komputilludoj estos oficialigita kiel mensmalsano venontjare

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

## UN deklaris la 23-an de septembro kiel Tagon de Signolingvoj
*Lasi neniun malantaŭe p. 03*


## Dependeco je komputilludoj estos oficialigita kiel mensmalsano venontjare
*Kiam la ludado iĝas plej grava ol aliaj vivinteresoj p. 04*

## Belgio/Sudano: kio okazis al la migrantoj, kiujn Belgio resendis al Sudano
*Minacoj suferitaj, restrikto de libereco, torturo p. 05*

## Hodiaŭe
*Adam Mickiewicz; Francisko Valdomiro Lorenz; kaj Birdo p. 06*

# UN deklaris la 23-an de septembro kiel Tagon de Signolingvoj

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris la 23-an de septembro kiel Internacian Tagon de Signolingvoj. La rezolucio unue estis unuanime adoptita dum la 48-a kunveno de la Tria Komitato de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 16-an de novembro 2017, kaj oficiale adoptita la 19-an de decembro ĉe la 72-a Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj.




La rezolucio estis proponita, aŭ patronita, de la Permanenta Misio de Antigvo-Barbudo al Unuiĝintaj Nacioj, post originala peto de la Monda Federacio de Surduloj, kiu laboris kun siaj landaj membroj por akompani subtenon de siaj respektivaj Permanentaj Misioj al Unuiĝintaj Nacioj, kiuj havas la povon ĉe la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj voĉdoni por adopti la rezolucion kiel kun-sponsorojn. La rezolucio estis kun-sponsorita de 97 Membroj de Unuiĝintaj Nacioj kaj adoptita per konsento.

Ambasadoro Walton Webson pri la Permanenta Misio de Antigvo kaj Barbudo al Unuiĝintaj Nacioj: "Ĉi tiu rezolucio estas grava marko en plenumo de nia internacia promeso "lasi neniun malantaŭe". La elekto de la 23-a de septembro kiel la internacia tago de signolingvoj estas grava paŝo en la universaligo de ĉiuj komunumoj por rekoni la objektivojn difinitajn en Artikolo 21 de la Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj por renkonti nian celon de inkludo. La Registaro de Antigvo kaj Barbudo havas la honoron esti parto de ĉi tiu internacia tago, kiu atentigos la mondon pri la principoj de la Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj alvokante egalecon, precipe koncerne alirebleco, kiu permesas individuan liberecon de elekto, digno kaj sendependeco sen diskriminacio. '

La elekto de la 23-a de septembro memorfestas la daton, kiam la Monda Federacio de Surduloj estis fondita, en 1951. Ĉi tiu tago markas la naskiĝon de organizo kiu ilin defendas, kaj kiu havas kiel unu el ĝiaj ĉefaj celoj la konservadon de signolingvoj kaj surda kulturo kiel bazo por la realigo de la homaj rajtoj de surduloj.

La unua Internacia Tago de Signolingvoj okazos la 23an de septembro 2018 kiel parto de la Internacia Semajno de Surduloj.

Prezidanto de la Monda Federacio de Surduloj, Colin Allen, diris la jenon: 'Ĉi tiu rezolucio rekonas la gravecon liveri signlingvojn kaj signolingvajn servojn al surduloj laŭeble plej frue. Ĝi ankaŭ emfazas la principon de "nenio pri ni sen ni" koncerne al laboro kun Surdaj

Komunumoj. Kun efiko ekde la jaro 2018, Monda Federacio de Surduloj tre ĝojas pro la ŝanco observi kaj festi tiun daton ĉiujare.'

La Internacia Semajno de Surduloj estis unuafoje okazigita en septembro 1958 kaj poste evoluis en tutmondan movadon por surdula unueco kaj agado por konsciigi homojn pri la malfacilaĵoj trovataj de surdaj homoj en iliaj ĉiutagaj vivoj. Monda Federacio de Surduloj forte kredas, ke la aktuala rezolucio de Unuiĝintaj Nacioj estas valora aldono al tiu tradicio kaj kreas la eblecon pliigi la komprenon de membroj de Unuiĝintaj Nacioj, privata sektoro kaj la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj pri fermado de ekzistantaj breĉoj en la atingoj de homaj rajtoj por surduloj.

La Monda Federacio de Surduloj esprimis sian sinceran dankon al la Permanenta Misio de Antigvo kaj Barbudo pro ĝia justeco, kunlaboro kaj subteno al ĉi tiu grava atingo por la tutmonda Surdula Komunumo kaj al ĉiuj partneroj kaj landoj, kiuj subtenis la rezolucion.

Rafael Henrique Zerbetto
El Popola Ĉinio

## Dependeco je komputilludoj estos oficialigita kiel mensmalsano venontjare

Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) anoncis lastĵaŭde, la 21-an de decembro, ke la dependeco je komputilaj ludoj estos agnoskita kiel mensa malsano kadre de Klasigo Internacia de Malsanoj (KIM), kiu estos publikigita en 2018.



La psika dependeco evidentiĝas kiam la ludado iĝas plej grava ol aliaj vivinteresoj, kaj ĝi restas, plialtiĝas eĉ je malbonaj sekvoj. Tiu diagnozo validas kiam la ludanto prezentas la simptomojn dum tempodaŭro da 12 monatoj.

Laŭ esploroj akcepititaj de MOS, kiuj estis cititaj de ĝia faka estro Vladimir Poznyak, en Eŭropo kaj Usono inter 1% kaj 5% de la ludantoj kongruus kun diagnozo de tiu dependeco, kaj en Azio ili estus ĝis 10%.

Tamen kadre de la kuracista komunumo tiu decido spertas kontraŭantojn, inter ili la psikiatro Allen Frances.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Belgio/Sudano: kio okazis al la migrantoj, kiujn Belgio resendis al Sudano

En septembro, Belgio asociiĝis kun Sudano por «selekti» la migrantojn en transito en Bruselo. Voĉoj leviĝis por kondamni kunlaboradon kun reĝimo persekutata pro genocido. Tri monatojn poste, la amasinformiloj publikigas nerefuteblajn atestojn de migrantoj, kiuj estis repatriigitaj.



La 17-an de septembro, la Ŝtatsekretario pri Azilo kaj Migrado, Theo Francken, fiere anoncis tion en sia Tvitera mesaĝilo: li pretiĝas akcepti «sudanan delegacion», kiu venas por partopreni al identigo de la «kontraŭleĝaj sudananoj ĉe la *Maximiliaanpark*».

Inter tiuj migrantoj, kiuj rifuĝas en la norda parko de Bruselo, multaj ne petas azilpeton en Belgio. Ili esperas daŭrigi sian vojaĝon al nordo de Eŭropo.

La belgaj aŭtoritatoj, kiuj timas kreon de «nova Kalezo», procedas al polica interveno en la parko. La lasta okazis la 20-an de decembro. La aŭtoritatoj konfirmis la interkonsenton kun Ĥartumo, kiu kondukis al repatriigo de 20 Sudananoj.

Kiel memorigas *De Morgen*, «Francken certigis, ke la delegacio reprezentas neniun danĝeron por la sudanaj migrantoj, kaj la ĉefministro konsentis kun tiu iniciato. Spertuloj alarmis pri la risko kunlabori kun la sudana reĝimo, persekutita de la internacia justico pro genocido kaj krimo kontraŭ la homaro. Kaj tiuj riproĉoj estas nun pravaj».

Inter tiuj spertuloj, Koert Debeuf, el la *Tahrir Institute for Middle East Policy*, kolektis pere de la tujmesaĝilo *WhatsApp* atestojn de sudananoj, kiuj estis repatriigitaj per tiu procezo. «Minacoj suferitaj, restrikto de libereco, torturo, la rakontoj priskribas virojn, teruritigitajn de la spionservoj», skribas *Le Soir*. Publikigitaj de la amasinformiloj la 20-an de decembro, ili estigis viglajn reagojn en Belgio.

Tiel, Kamal (kies nomo estis modifita), junulo 18-jara rakontas, ke en Belgio, li estis devigita konsenti pri «memvola reveno», kaj je sia alveno en Sudano, li tuj estis kaptita de la sekreta polico.

«Ili kondukis min en la oficejon de la spionservoj, kaj demandis min dum horoj, kial mi foriris al Eŭropo, kion mi faris tie [...] Mi estis longe batata ».

«Post 48 horoj, raportas *De Morgen*, la sekreta polico liberigis Kamal. Sed antaŭ tio, ili devigis lin skribi dokumenton, kiu malpermesas al li plenumi politikajn agojn, kaj ke li forlasu la landon». Kamal fuĝis, kaj troviĝas nun en Libio. Li deklaras: «Mia vivo estas en danĝero»

**«Neniuj oficialaj plendoj»**

Post tiuj malkaŝoj, raportas *Le Soir*, «la tutan tagon, sin sekvis komunikaĵoj de asocioj, kaj de politikuloj hororigitaj, postulante ĉesigi resendon de sudanaj landanoj, almenaŭ ĝis kiam la faktoj estos konfirmitaj».

«La registaro malfacile ŝajnigos nescion pri la

risko de torturoj, kiu estis multfoje elvokita dum la debato, kaj ofte kun detaloj», notas la belga ĵurnalo.

Demandite pri la temo, fare de la RTBF, Ĉefministro Charles MICHEL tamen deklaris la 21-an de decembro, ke la registaro «ne ricevis oficialan plendon». Li aldonis, ke enketo estos plenumita, kaj ke atendante la konkludon, «repatriigo ne plu okazos ĝis fine de januaro»

Neniam Milito Inter Ni



## Adam MICKIEWICZ

**Adam Bernard MICKIEWICZ [mickjeviĉ] (naskiĝis la 24-an de decembro 1798 en *Zaosie* (aŭ *Nowogródek*), nuna Belorusio, mortis la 26-an de novembro 1855 en Konstantinopolo, nuntempe: Istanbulo, Turkio) estis pola poeto. Li estis la plej grava reprezentanto de la pola romantismo.**


**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**


**Vikipedio**

## Francisko Valdomiro LORENZ

**Francisko Valdomiro LORENZ [fransiskŭ valdomirŭ lorenz laŭ brazila prononco] (ĉeĥe: František Vladimír Lorenc; germane: Franz Vladimir Lorenz; naskiĝis la 24-an de decembro 1872 en *Zbyslav*, en la nuna Ĉeĥio, mortis la 24-an de majo 1957 en *Dom Feliciano*, Brazilo) estis ĉeĥa esperantisto, kiu vivis la plejparton de sia vivo en Brazilo. Verkis plurajn verkojn kaj tradukojn.**

**Vikipedio**





## Bildo de la tago

***Ceryle rudis leucomelanurus*,**

**Barato.**

**Vikipedio**